NIA VOĈO
Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98-4°.28012 Madrid
(91) 530 87 98 persone lunde vespere
aliajn tagojn, aŭtomata respondilo
Redaktas kaj eraras Lupe Sanz
APRILO 1997

**ESPERANTO EN "INTERNET"**

La du unuaj ĵurnaloj kiuj aperis en internet estis "El Correo del Esperanto" kaj "Kajeroj el la sudo" ambaŭ ene de la TTT paĝo http://www.mur.hnet.es/uphm/jesuo/espe.html.
Sed ankaŭ aperas aliaj: Ekz: Esperanto, La espero, Monato, Sennaciulo, Eventoj, ktp.. Por vidi kelkajn el ili oni devas pagi abonon.
Flandra Esperanto ligo oferas unu el la plej grandaj TTT paĝoj kun pli ol 1 Mb da informoj kun propra serĉilo.

**LICEANOJ EKSTERLANDE**

Miguel Fernández estis invitita kiel preleganto al Internacia Kongreso de SAT kiu okazis dum Pasko en Limoges (Francio). La konferenco temis pri la verko de F. García Lorca.

**ESPERANTO EN AMAS-KOMUNIKILOJ**

La murcia ĵurnalo, "La Opiniön" publikigis artikoleton pri la esperanta ĵurnalo "Kajeroj el la sudo" kiun direktas en Murcio Jesús de la Heras (profesoro de la angla, profesoro de hispana guitaro kaj Murcia delegito de HEF)). Oni eldonas 500 ekzemplerojn kaj dissendas al 40 landoj.

La pola televido komencis (oktobro-96) elsendon de la E-versio de la instru-filmo "Mazi en Gondolando". La kurso estas ene de tre populara programo por junularo, ĉiun duan sabaton antaŭtagmenze

Rodrigo Fresán (Buenos Aires 1963) eldonis romanon titolitan "Esperanto". (Tusquets. Barcelona 1997. 220 paĝ. 2.000 ESP). La verko ne temas pri la internacia lingvo, sed pri la lastjara historio de Argentinio kaj pri la espero en la estonto.

*HEF ANGULO*




La estraro de HEF decidis renovigi la logotipon, kiu aperas en siaj leteroj, dokumentoj kaj kovertoj. Ĝi konsistas el litero "e" tri kolora: (1) hel-blua, (2) blua-verda kaj (3) miela.

**HISPANIO**

**Madrido.** Kiel kontribuo al 450-a datreveno de la naskiĝo de Miguel de Cervantes, MEL donacis al la Sociedad Cervantina Madrileña kelkajn ekzemplerojn en esperanto de verkoj de Cervantes, antaŭ kelkaj jaroj MEL donacis "El Quijote" kiu estas en montrofenestro ĉe la halo de la asocio.

**Sabadell** Ateneo Libertario de Sabadell daŭrigas siajn kursojn de Esperanto

**EKSTERLANDE**

La nombro de eŭroparlamentanoj kiuj apogas esperanton en januaro kreskis al 101 personoj: Jen hispanoj, Concepción Ferrer, Carles Gasóliba, José Mª Gil-Robles kaj Manuel Medina Ortega.
Esperanto-Ligo de Nordameriko akiris bone memoreblan (por telefoniloj kun literoj) senkostan telefonnumeron (por usonaj alvokoj): 800-ESPERANTO = 800-377 3726

## VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Ĉiu-lunde ni kunvenas, ekde la 18,30 horo, ĉe MEL, Atocha 98-4°
Marde kaj jaŭde (18,00 ĝis la 20,30 h) funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3°-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson (91) 446 80 79

**Kursoj**:
Centro Cultural "Maestro Alonso" (kvartalo Ventas). Merkrede 18.30 ĝis 20.00.
Centro de Día Puente de Toledo. Mercedes Arteaga 18
Madrida Esperanto Liceo: Supera kurso. Lunde je la 20,30 h.
Baza kurso. Merkrede kaj vendrede je la 19.00h

**Prelegoj:** 19,30 horo en Atocha 98-4°
21-an aprilo "La decimala sistemo por mezuri spacon kaj tempon". L. Ojer
19-an majo "Faciligi artefaritajn lingvojn" A. Casanoves

**6-an de aprilo, dimanĉo, 11.30 horo ĉe CENTRO CULTURAL DE LA VILLA (Plaza Colón)**
**OMAĜO AL ANTONIO PLATAS "Ant-Platas"**
**Organizas Junglista Asocio pro lia emeriteco**
**Bileto 2.500 pesetojn**

## VALENCIAJ KONGRESOJ

Turespaña finfine donacis 250 afiŝojn por anonci la kongresoj.
El Corte Inglés konfirmis ke ĝi sendos 800 plastajn saketojn por disdoni la dokumentojn de la kongreso

## KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

28-a Kataluna kaj 1-a Transpirenea Kongreso de Esperanto. 1-4 de majo. Figueres
49-a Kongreso de Internacia Fervojista E-Federacio. 10-17 majo 1997. Koŝice, Slovakio
3-a Europ-Unia E-Kongreso. 16-19 majo 1997. Stutgarto (Germanio)
7-a Internacia Kongreso de Monda Turismo. Valencio (Hispanio) 8-13 julio.
**56-a HISPANA ESPERANTO KONGRESO. Valencia (Hispanio) 8-13 julio**
82-a UK de Esperanto. 19-26 julio 1997. Adelajdo (Aŭstralio)
83-a UK de Esperanto. 1-8 aŭgusto 1998. Montpeliero (Francio)
5-a Esperanto-Semajno por la Kulturo kaj turismo. 4-11 oktobro. San Carles de la Rápita (Tarragona)

## *KOTIZO POR 1997*

***La kotizo por tiu-ĉi jaro estas sama ol la lastaj kvin** jaroj. Bv. se vi ankoraŭ ne abonis ĝin **sendi ĉekon po 2.000 PTA**, je la nomo de ESPERANTO-LICEO DE MADRID. Antaŭ-dankon pro via kontribuo al laŭrigado de MEL.* Pro la altiĝo de la procento pagenda al banko NI PETAS AL MEMBROJ KIUJ PAGIS PER BANKO KE ILI PAGU PER ĈEKO ***Vi povas pagi rekte ĉe la Liceo (lunde vespere).***

:::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::

ESPERANTO LICEO DE MADRID
Atocha 98-4°
28012 Madrid
Asociación de Utilidad Pública Municipal

# AMIKO JUAN CARLOS



Kiam ankoraŭ estas freŝa en nia memoro la terura novaĵo de la forpaso de nia kara Ada Fighiera, Juan Carlos, vi lasas nin orfaj je vi, kiam vi estas en la floro de via vivo, kaj kiam ĉiuj plej bezonas vin. La 1-an de februaro, post kruela malsano, kontraŭ kiu vi kuraĝe batalis, kaj ĉirkaŭata de viaj multegaj amikoj kaj familianoj, vi foriris, nur 43-jara.

Mi ankoraŭ rememoras kiam, en la jaro 1977, do, jam 20 neforgeseblaj jaroj pasis, vi, kune kun via kara Maribel (poste via edzino), kun Pedro Vilaroig (kun kiu vi fondis la ĥoron "Verda Stelo", nun prestiĝa kaj altnivela), kaj aliaj junaj amikoj, subite aperis en la tiama aĉa sidejo de Madrida Esperanto Liceo, por lerni Esperanton. Ekde tiam la vivo de la Liceo, kaj nia vivo, tute ŝanĝiĝis. Nova fresa aero venis. Kio estis nur asocio transformiĝis al familio. Vi alportis krom vian ĉiam konstantan kaj entuziasman laboron, ion multe pli grava: amikecon, bonan humoron, solidarecon, brilajn interesajn projektojn.

Ekde tiam mi havis vin kiel ekzemplo. Vi kaj viaj amikoj estis homoj kun eksterordinaraj kondiĉoj: kleraj, inteligentaj, laboremaj, imagplenaj, kaj mi multe lernis de vi.

Ofte, preskaŭ ĉiun semajnfinon, ni komencis iri al la montaro aŭ al malproksimaj lokoj, por tendumi, koni la mirindaĵojn de la naturo, ĉiam per niaj aĉaj aŭtomobiloj , niaj dorsosakojn kaj niaj tendoj. Tio kreis ke nia asocio estu ĉiam plena je homoj, kaj fariĝis kvazaŭ ilia dua hejmo. En grandaj junaj grupoj ni komencis viziti la naciajn kaj internaciajn kongresojn, renkontiĝojn, kaj ĉian esperantan aranĝon, en kiuj la juna grupo de Madrida Esperanto Liceo neniam mankis, kaj donis brilon kaj gajecon. Ĉefe vi, nia gvidanto, kiu rapide kreis bonhumoran etoson, kaj tuj estis la centro de ĉiu kunveno, pro via simpatio kaj laboremo. Neniam mankis via speciala maniero kanti "Granada", ĉiam sukcesa enlande kaj eksterlande. Kaj neniam mankis via ĉiama saluto "Feliĉan Paskon", dum la tuta jaro, kaj via disdonado de gumaj globoj al la infanaro.

La hispana movado estis en granda parto ŝanĝita de vi, ĉar pere de vi multaj esperantistoj, inter ili mi mem, lernis kiel sanĝi la tro oficialecan kaj seriozan manieron funkcii, al alian, pli agrabla kaj familia. Tiun laboron ni konservos kiel nia ĉefa heredaĵo de vi, kaj pere de ĝi vi estos ĉiam kun ni, ĉiam en nia memoro, kaj kvankam tristaj, ni restas dankemaj kaj pensos ĉiam pri vi kaj pri via personeco, kaj pensante kiom vi donis al ni ĉiuj ni klopodos ĉiam sekvi vian ekzemplon. Vi ĉiam estos la pruvo ke idealismo, altruismo, solidareco, ankoraŭ ekzistas, kaj ke ĉiam ekzistos homoj kiuj donos ĉion por la bono de la homaro, klopodante ke la mondo estu pli agrabla, pli solidara, pli justa.

Kaj, kion diri pri via, ni diru, oficiala biografio, impona en tiom malmultaj jaroj. Doktoro Inĝeniero pri Minoj. Sciencistoj de C.S.I.C. Vi produktis 42 sciencajn verkojn, enlande kaj eksterlande. Unu libron pri bibliografia investigado kaj 19 monografiojn pri la sama temo.Kunlaboranto de multaj universitatoj de la tuta mondo. Tri patentoj sciencaj kaj 46 verkoj de teknologia apogo. 65 verkoj prezentitaj en sciencaj kongresoj naciaj kaj internaciaj. Diplomito en "Eŭropaj Komunumoj", kaj en la Diplomatika Fako. Partopreno en 28 programoj de investigado kun C.S.I.C., krom 6 de la Eŭropa Unio. Gvidanto de diversaj doktoriĝoj, inter kiuj, bedaŭrinde, troviĝas la mia mem, por kiu mi bezonis vian konstantan helpon, kaj kiun mi nepre deziras fini kiel rememoro al vi, mia plej bona amiko kaj gvidanto. Konsilanto de la Ministerio pri Industrio en la Eŭropa Programo EURAM. Sed, ĉar via nur "simpligita "faka biografio postulus pli ol tri paĝojn, ni parolu pri via esperantista aktivado.

Vi esperantistiĝis en Madrid, en 1977. Partoprenanto en multaj kongresoj, inter kiuj citindas la hispanaj en León, Gijón, Málaga, Bilbao, 2 en Madrid, Valencia, Sant Cugat, Murcia , Salou. La internaciaj de Antwertpeno, Lovaina, Varsovio, kaj Valencia. Ĉiam kun aktiva partopreno, kaj neniam kiel nura aŭskultanto. 8 jarojn Vicprezidanto de Madrida Esperanto Liceo, ties nuntempa Prezidanto (entute 16 jarojn kiel membro de la Estraro).

Prezidanto de la Hispana Kongreso de Esperanto en 1980, kaj Vicprezidanto en 1987. Viceprezidanto kaj vera motoro de la LKK de la Universala Esperanto-Kongreso, en Valencia 1993.

Inter viaj multaj esperantistaj verkoj ni devas mencii vian grandan laboron en la traduko de

polifoniaj kantoj al Esperanto. Verkojn prezentitaj en la Hispana EsperantoKongreso de Gijón, pri "Civitana partopreno kaj Esperanto"; en tiu de Bilbao pri "Asocioj kun Publika Utileco". Redaktado de la nova Statuto de Madrida Esperanto Liceo 1979. Amason da artikoloj en esperanto en la gazetaro nacia kaj internacia. Tekston en esperanto de la "Himno de' Madrida Esperanto-Liceo". La verkon "DATOS SOBRE EL MOVIMIENTO ESPERANTISTA 1887-1987". La Dosieron por atingi la deklaron de "Publika Utileco" por Hispana Esperanto-Federacio, atingita de la Hispana Konsilio de Ministroj en aŭgusto 1993. Kaj multe pli. Maribel Alonso, edzino, ricevis en 1995 la meritan premion "Klara Silbernik", pro ŝia konstanta apogo al Juan Carlos, kaj pro ŝia konstanta laboro por Esperanto.

Tamen via plej granda kontribuo estis via konstanta laboro. Instruisto, oficisto organizanto, balaisto, masonisto, farbisto, portisto, ĉion vi faris, kun ridetanta mieno, sen plendoj, en labortagoj kaj en festotagoj, sola aŭ akompanata, sed kutime ĉirkaŭata de viaj multaj amikoj, kiuj kiam temis pri vi, ĉiam estis pretaj kunlabori, ĉar kun vi laboro transformiĝis en amuziĝo.

Kara Juan Carlos. Mi scias ke vi ĉiam estos kun ni ĉar via ekzemplo restas. Kaj kun via edzino kaj gefiletoj, niaj karaj Maribel, Sergio kaj Bárbara, kiuj havis la feliĉon, kvankam mallonga, havi vin kiel edzo kaj kiel patro, kaj ĉefe kiel amiko.

Kara Juan Carlos, ĝis revido ie, iam.

Augusto